BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

CGC Nº
00406 504/0001-06

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

AGO/SET 1982 | BOLETIM INFORMATIVO | Nº 72

## CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO ESTAS LA ĈEFA TEMO DE BKE-KONGRESO 1982

La estraranoj de BKE, kunvenintaj dum la 2a Sudbrazila Esperanto-Renkontiĝo okazinta en Curitiba-PR, decidis akcepti invitproponon de Laborgrupo Antaŭen, por okazigi en Brazilio, de la 3a ĝis la 5a de decembro 1982, la 3an jarkongreson de nia organizaĵo, kies ĉefa temo estos la 100-jara Jubileo de Esperanto.

Krom diskutoj pri venontjara buĝeto, kaj pri bilanco kaj kontoj de la pasinta administra periodo 1981, kio verŝajne vekos la atenton nur de nia anaro, la Loka Organiza Komitato klopodas organizi enhavoriĉan programon, kiu antaŭvidas kulturajn prelegojn, primovadajn diskutojn, artajn spektaklojn, ekskursojn, bankedon, distrajn aranĝojn, lotumadon k.t.p., kio certe plej allogos la kongresanaron.

Tamen, ni kredas, la plej interesa programero por E-aktivuloj koncentriĝos en la diskutoj pri la ĉefa kongresa temo. Pro tio, kun la celo venigi multvarian diskutindan materialon kaj prelegontojn el la tuta lando, en nomo de la Konstanta Nacia Komisiono kiu respondas, inter diversaj taskoj, pri la kunordigado de la kvinjara (1983/7) programo pro la Jubileo de Esperanto en 1987, ni faras ĉi tie jenajn sugestojn: a) laŭvole, ĉiu organizaĵo kaj aktiva esperantisto aliĝintaj al unu el la tri tutlandaj asocioj (BEL, KKE kaj BKE), sendu rekte al la respektiva Prezidanto siajn tiucelajn agadplanojn; b) aliaj nealiĝintaj organizaĵoj - esperantistaj aŭ simple simpatiantaj al nia Lingvo - enskribu ĉe la Loka Organiza Komitato (LOK) reprezentanton por prezenti kaj defendi en publika kunsido siajn samcelajn projektojn.

Pri la afero oni ne forgesu, kompreneble, ke proponaĵo implicanta eĉ malaltan koston, devas klare difini la korespondan enspezfonton uzotan por sukcesigi la projekton.

Koncerne la administran organizadon de la kongreso, la institucioj kaj personoj kiuj intencas starigi en ĝia kadro specifan kunsidon aŭ disvendi objektojn, librojn kaj ĉiuspecajn esperantaĵojn, anticipe skribpetu permeson al LOK, por tion fari, ĉar necesas antaŭposedi taŭgan rajtigilon, sen kiu neniu povos aparte kunsidi aŭ komercadi en la kongresejo.

Ene de tiu ĉi Bulteno vi trovos la kongresan aliĝilon, kiun - ni petas - bonvolu plenumi kaj sendi al LOK, kiel eble plej baldaŭ.

Gesamideanoj, aliĝu amase! Se unuiĝo estas forto, nepre ni pruvu tion ĉi en Brazilio, okaze de BKE-Kongreso 1982.

Carlos A. S. da Cunha
BKE-Prezidanto

**BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO**

Honora Prezidanto
Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP.

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SOS 306-A 101,BR 70353-Brasília-DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

**Informa Bulteno**

Oficiala organo planita por monata apero.

Dissendo senpaga

RESPONDECAJ DIREKTOROJ: Carlos A. S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## 75 JAROJ DE SKOLTISMO

La festoj komenciĝis la 22an/februaro/82 kaj finiĝos okaze de la Monda Ĵamboreo, dum julio/83 en Kanado. Tamen la pinta periodo estis la semajno de la 1ª ĝis la 9ª/aŭgusto/82 memore al la unua skolta tendumado okazinta en la insulo Brownsea, Britio.

La devizo de la festoj omaĝe al la 75-jariĝo de skoltismo kaj 125 de la naskiĝo de ĝia fondinto Lordo Baden Powell estas: "Skoltoj, 75 jaroj por pli bona mondo". Kaj ĝi estas vera defio por ĉiuj batalantoj de la skolta movado. La periodo 82/83 instigas ĉiujn al iom pli da laboro por ke ni havu pli bonan mondon pere de vasta kaj intensa agadprogramo, en ĉiuj socitavoloj kaj tra la tuta mondo.

En Brazilio, grava filatela ekspozicio okazas ĉe la halo de la ĉefa konstruaĵo de E.B.C.T. (Brazila Poŝta kaj Telegrafa Entrepreno), kiu ankaŭ eldonis belan poŝtmarkon. Per ĉiuj TV-stacioj fariĝas trafa propagando tra la tuta Brazilo, kaj plurajn aliajn aktivecojn oni planas en diversaj niveloj: socia, komunuma kaj oficiala..

Oni ankaŭ devas reliefigi, ke UNESCO aljuĝis al la Tutmonda Organizaĵo de la Skolta Movado la Premion pri Edukado por la Paco - 1981, unua jaro kiam tiu premio okazis. La Ĝenerala Sekretario de la menciita organizo




Lazslo Nagy, diris en sia dankparolado: "Nia celo estas labori por la disvolviĝo de la gejunuloj, kiuj devas malkovri sian tutan potencialon kaj kiel individuoj kaj kiel membroj de la komunumoj lokaj, naciaj kaj internaciaj".

Ekzistas ĉirkaŭ 16 milionoj da skoltoj en pli ol 150 landoj. Sur du principoj baziĝas la edukaj metodoj de skoltismo: 1) lojaleco al sia lando harmonie kun la starigo de paco, interkompreno kaj kunlaboro; 2) partopreno kaj en la evoluigo de la societo kun respekto al la digno de siaj kamaradoj kaj en la integreco de la natura mondo.

NPS

## LA CIFEROJ PAROLAS . . .

Pirarbo

El la 143 ĝisnunaj Individuaj Membroj de BKE oni povas konstati, ke - laŭ Federaj Unuoj - 42 loĝas en ŝtato San-Paŭlo, 30 en Rio de Janeiro, 22 en la Federa Distrikto, 14 en Minas Gerais, 11 en Suda-Riogrando; entute 119, t.e. ĉirkaŭ 83%.

Se oni analizas laŭ la urboj oni trovas: 22 en Brazilio, 19 en Rio, 16 en San-Paŭlo, 10 en Santos, 7 en Porto Alegre, 6 en Salvador, 5 en Belo Horizonte; entute 85, kiuj reprezentas ĉirkaŭ 60%. Kaj tiuj vivas en 7 el la 49 urboj, kie estas BKE-anoj.

Aliflanke, kalkulante 143 membrojn po Kr.1.200 (jarkotizo), BKE enspezas jare Kr. 171.600. Nur por eldono kaj dissendo de la Bulteno ĝi elspezas ĉiumonate Kr. 30/40.000, kio en la jaro sumas Kr. 360/480.0000!!!

# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

★ REVISTA BRASILIA - (C. Postal 07-0467 - 70000 Brasília-DF) en la n-ro Aŭgusto/82 aperigas anoncon pri BKE kaj volas regule publikigi rubrikon, al kiu oni devas sendi materialon.

★ Nia s-ano HEITOR LUIZ M. M. QUINTELA (SQN-307/C/203 - 70746 Brasília-DF) havas kontakton kun INTERNACIA ESPERANTO-AMIKARO DE ROTARIANOJ (Kinburn House - Egham Hill - Egham - TW20-OBD BRITIO). Kie la brazilaj rotarianoj por plifortigi IEAR?

★ S-ano RAIMUNDO FRANCISCO OLIVEIRA (Rua 8 casa 2 - Metropolitana/ NB - 71700 Brasília-DF) intencas partopreni TV-programon de J. Silvestre kaj respondi pri la vivo de Zamenhof. Bv. sendi al li materialon.

## MINAS GERAIS

★ En Belo Horizonte, S-ano José Roiz, kuracisto, verkisto kaj E-instruisto ĉe Sociedade Mineira de Esperanto, publikigis en loka gazeto tre interesan artikolon pri oficiala instruado de Esp. en lernejoj.

## PERNAMBUKO

★ Reaperas "Pernambuco Esperantista", oficiala organo de Associação Pernambucana de Esperanto (C. Postal 1139 - 50000 Recife-PE). Ĝi estas mimeografita, sed laŭ enhavo sekvas la tradicion de la iama revuo samnoma.

## RIO DE JANEIRO

★ La tre aktiva E-Klubo de Volta Redonda tradukis kaj dissendas al la gazetaro artikolon de Prof- D-ro Giorgio Canuto pri la uzado de internacia lingvo sur la teknika-scienca kampo.

★ S-ano JORGE DAS NEVES (R. Barata Ribeiro, 727/107 - 22051 - Rio de Janeiro - RJ), kiu laŭ tio kion li mem diras estas "edzo, poeto kaj movadano tra la ŝoseoj de la terglobo" - ĉiam faras grandan bruon pri Esp. ĉe la lanĉo de siaj verkoj.

★ SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ raportas en sia bulteno "Komunikoj" pri la laboro de Dep. Freitas Nobre: "La starigo de speciala fako estas tre grava al la Deputita Ĉambro, ĉar tiamaniere la brazilaj deputitoj, entute kvarcent dudek, estos bone informitaj pri la afero lingvo internacia ..."

★ Sub la aŭspicio de la Belga Konsulejo, la belga pianisto-esperantisto GEERT DEHOUX prezentis recitalon, la 15an de aŭgusto, ĉe Tijuca Tenis Clube, kie ankaŭ okazis 3-taga ekspozicio kaj prelego de Prof. Sylla Chaves.

## RIO GRANDE DO SUL

★ S-ano OTTO G. VASKE gvidis E-kurson en du semajnfinoj ĉe la Fakultato de Cachoeira do Sul-RS. Li ankaŭ komunikas, ke la urbestro de Novo Hamburgo-RS, per Leĝo 35/82, donis la nomon RUA ESPERANTO al unu strato en la antaŭurbo Roselândia.

★ GAŬCA ESPERANTO-ASOCIO (Rua dos Andradas 1137, Conj. 1704, Porto Alegre) estis fondita la 31an de julio 1982, kun la celo kunigi ĉiujn E-organizaĵojn el Ŝtato Rio Grande do Sul. Ni ĝojas pro la grava evento kaj varme gratulas kaj salutas ĝiajn estraranojn kaj tre karajn amikojn niajn, nome: Ivo Sanguinetti - Prezidanto; Manoel Torres de Abreu - Vicprezidanto; Paulo Ereno - Sekretario; Wenceslau Gonçalves - Kasisto; B. Egon Breitenbach - Estrarano pri Publikaj kaj Kulturaj Rilatoj; Armindo Trarbach, George Otto Vaske kaj Paulo Caruso - Membroj de Kontrola Komisiono; kaj D-ro Modesto Belmonte de Abreu - Honora Prezidanto.

## SAN-PAŬLO

★ Fondiĝis Jundiai Esperanta Grupo (C. Postal 829/Ag. Centro - 13000 Jundiai SP), kiu jam organizas kursojn kaj bibliotekon.

★ BRAZILA KATOLIKO (C. Postal 4421 - 01000 S.Paulo - SP) daŭre aperas kun tre interesa enhavo. Indas mencii la ĉefartikolon pri la Leĝo-Projekto de Dep. Freitas Nobre kaj la transskribo (portugallingve) de la intervjuo pri "Dinamika Kurso" de Prof. Nelson P. Souza.

★ AMORC-CAPÍTULO SÃO MIGUEL PAULISTA (R. Crizolita Rodrigues Pereira, 14 - 08000 São Miguel Paulista - SP) okazigis E-kurson, kiun organizis la loka Esperanta Klubo Zamenhof (R. Idioma Esperanto, 335).

★ SOROKABA ESPERANTO-KLUBO (Rua da Penha, 455 - 18100 - SorocabaSP) pledis ĉe la Superintendanto de la Lotumoj de Federacia Ŝparkaso por ke el ties profitoj oni donacu parton al la Esperanto-Movado. Ĉiuj skribu al: Superintendência das Loterias - Caixa Econômica Federal - 70000 Brasilia-DF).

★ Sub iniciato de Cap. PM. D-ro Juvenal Tavares da Silva kaj kunhelpo de D-ro Alcyr Guedes de Almeida, kunsidis en Taubaté, en la 4a kaj 11a de septembro, diversaj personoj konsistigantaj la komisionon kiu celas revigligi la E-movadon en la regiono nomata "Vale do Paraíba". Jen la frukto de la 8a San-Paŭla EsperantoRenkontiĝo, okazinta ĉi-jare en São José dos Campos.

★ Ni varme gratulu Majoron Gilberto Silva Velho, pro la honoriga diplomo al li solene transdonita de la Komunuma Kultura Konsilio de Jundiaí, la 9an de septembro, en nomo de la urbestro, s-ro Pedro Favaro. Tiun honoron plenmeritis Silva Velho, pro lia granda laboro kunhelpi kaj propagandi la esperantajn kursojn organizitajn de la Sekretariejo pri Edukado, kulturo, Sportk kaj Turismo de Jundiaí.

## PROFESSORO JOSÉ PASSINI KAJ INSTRUADO DE ESPERANTO EN BRAZILAJ UNIVERSITATOJ

Berenice K. Eliot

Profesoro en la Federacia Universitato de Juiz de Fora (UFSF), ŝtato Minas Gerais, samideano José Passini estas multe konata en nia lando, inkluzive pro la kompara studo inter kvar planlingvoj (Volapük, Ido, Occidental kaj Interlingua) kaj Esperanto, kaj inter tiu ĉi kaj nia patra idiomo, kiun li prezentis en la Beletra Departemento de la Pontifika Katolika Universitato de Rio de Janeiro (PUC/RJ), kiel parto de la postuloj por fariĝi Doktoro pri Portugala Lingvo. Multaj eksterlandanoj ankaŭ havis okazon konatiĝi persone kun li, en 1981, dum la 66a UK en Brazilio, kiam Profesoro Passini gvidis ekspresan enkondukan kurson pri nia lingvo.

Bone, tiun ĉi altrangulon la Redakcio sugestis al mi intervjui ĉimonate en Juiz de Fora. Bedaŭrinde, mi ne povis fari la vojaĝon . . . sede mi faris la intervjuon, surbaze de skribaj respondoj al demandaro kiun mi antaŭpreparis por D-ro Passini, nome:

— Kiujn postenojn vi okupas en la diversaj fakoj de UFJF?

Mi estas profesoro-adjunkto de Beletra Departemento, kie mi instruas la italan kaj Esperanton. Nuntempe mi estas estro de la Departemento kaj vic-direktoro de Instituto de Homaj Sciencoj kaj Beletro de Federacia Universitato de Juiz de Fora.

— Kion vi povas diri pri via sperto ĉe UFJF?

Mi povas diri tutcerte, ke la ĝenerala opinio pri Esperanto ŝanĝiĝadas ĉiam pli kaj pli favore al nia lingvo. Antaŭ dudek jaroj, kiam mi eniris la universitatan medion, estis tre malfacile eĉ aŭdigi ion pri Esperanto.

— Kiun pozicion havas Esperanto kiel lernobjekto ĉe UFJF?

Esperanto estas instruata kiel laŭelekta ordinara lernobjekto de Beletra Departemento, en du semestroj po 60 horoj - 4 poentoj. Esperanto I kaj Esperanto II valoras egale al la aliaj fremdaj lingvoj instruataj en la Departemento, nome angla, franca, germana, hispana kaj itala. Estas nur uni diferenco: Esperanto estas instruata en du semestroj dum la aliaj lingvoj postulas de ses ĝis ok semestrojn. Ĉiuj studentoj rajtas studi Esperanton.

— Kiel reagas la universitatoj profesoroj ĝenerale pri la instruado de Esperanto en la fakultatoj?

Nuntempe la universitatoj profesoroj ĝenerale reagas favore al Esperanto, teman kelkfoje oni renkontas oponantojn, precipe inter profesoroj pri fremdaj lingvoj.

— Kiel statas la instruado de Esperanto en la brazilaj universitatoj?

Esperanto estas instruata en pluraj brazilaj universitatoj kaj fakultatoj. Bedaŭrinde en kelkaj el ili ĝi ne estas instruata kiel ordinara lernobjekto, sed nur kiel aparta kurso. Tiaj kursoj, kvankam tre utilaj por la disvastigo de nia lingvo, kelkfoje daŭras nur dum la restado de la profesoro, kiu illin starigis. Kiam la stariganto kaj subtenanto translokiĝas, emeritiĝas aŭ mortas, kun li foriras la kurso.

— Kiujn solvojn vi propanas? Kion oni devus fari tiucele?

Mi proponas, ke ĉiuj, kiuj batalas favore al la enkonduko de Esperanto en universitaton, fakultaton aŭ iun ajn lernejon, ĉiam klopodu starigi ĝin kiel ordinaran lernobjekton, eĉ se pro tio oni devas atendi iom pli da tempo.

— Kiel oni povas oficiale havi Esperanto-instruistojn?

Profesoroj diplomitaj pri lingvo-instruado, kiuj kapablas instrui Esperanton, rajtas instrui ĝin, ĉar en Brazilo ne estas ankoraŭ diplomiĝo pri Esperanto en universitata nivelo.

Se ne estas profesoro diplomita pri lingvoinstruado aŭ beletro, profesoro pri aliaj fakoj rajtas instrui ĝin. La universitatoj havas liberecon decidi tion. Mia universitato permesis al mi instrui Esperanton surbaze de deklaracio de Beletra Departemento, al kiu mi prezentis diplomon de Supera Kurso de Brazila Esperanto-Ligo. Fakte mi jam estis profesoro pri la itala lingvo.

— Kion vi opinias pri jam ekzistantaj leĝoj kaj pri la Projekto de Deputito Freitas Nobre por enkonduko de Esperanto en la enirekzamenojn de universitatoj?

Mi opinias, ke la ekzistantaj leĝoj se ne devigas la enkondukon de Esperanto en universitaton, almenaŭ ne malpermesas tion. La libereco de universitatoj estas granda. Ĉiuj universitatoj estas liberaj krei kian ajn lernobjekton.

Pri la Projeto de Deputito Freitas Nobre mi opinias, ke ĝi estas altvalora klopodo favore al Esperanto. Ĉiuj esperantistoj varme aplaŭdas ĝin. Tamen, mi pensas, ke ĝi estus pli facile aprobita se ĝi celus la enkondukon de Esperanto en la enirekzamenojn de universitatoj kie Esperanto jam estas instruata. Tio faciligus la aferon kaj faligus argumenton de kontraŭuloj.

— Kion vi povas aldoni?

Mi devas diri, je mia batalado cê Federacia Universitato de Juiz de Fora ankoraŭ ne finiĝis. Nuntempe mi atendas konvenan oportunecon por komenci novajn klopodojn: unue enkonduki Esperanton en enirekzamenojn (problemo forigota de la supre citia leĝo), kaj poste ebligi diplomiĝon pri Esperanto.



# TRA LA MONDO

★ En Izraelo faras esplorojn pri la vivo de D-ro Zamenhof kaj la judaj aspektoj de Esperanto: 1) Prof. David L. Gold, ĉe Univesitato de Haifa; 2) Prof-ino Matilda Landau, ĉe la Popola Lernejo de Gratz, en Tel-Avivo.

★ COMISIÓN DEL IDIOMA UNIVERSAL ESPERANTO (C. C 225 Suc. 13 - Buenos Aires 1413 - Argentino) pledas ĉe la aŭtoritatoj, ĉefe la Ministerio pri Edukado, por la uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj anstataŭ aliaj nacilingvoj.

★ ARGENTINA ESPERANTISTO - bulteno de Argentina E-Ligo (C. C. 17 Suc. 53 - Buenos Aires 1453 - Argentino) raportas pri la Movado en tiu lando kaj informas la okazigon de la 43ª Argentina Kongreso, de la 31ª/marto ĝis la 3ª/aprilo venontjare, en la urbo Neuquén. Adreso: S-ro Rodolfo Calógero - C.C. 435 - 8300 Neuquén - Argentino.

★ NOVA BIOLOGIA NOMENKLATURO - (Hertendreef 12, B-2180 Kalmthout - Belgio) estas interesa asocio, kiu strebas por nova sistemo por la sciencaj nomoj de animaloj kaj plantoj, kiu baziĝas sur klare difinitaj principoj kaj en kiu Esp. estas uzata. Biologoj aŭ ne povas aliĝi por pliviglígi la asocion.

★ AGADO E-3 (Henegouwenlaan 35 - 1966 RH Heemskerk - NEDERLANDO) signifanta "Esperantistoj Esperigas Esperantistojn" -, kiu en kunlaboro kun Fondaĵo H.J.M. Weve zorgas pri blinduloj en Afriko - atendas vian helpon!

★ RADIO VATIKANA (Piazza Pia, 3 - I-00193 Roma - ITALIO) sendis gratulkarton al BKE pro la starigo de E-Fako ĉe la deputiteja biblioteko: "ni gratulas pri la brila sukceso kaj deziras pluan prosperon". Koran dankon!

## KAMPANJO POR ATINGO DE 250 INDIVIDUAJ MEMBROJ

Kun granda ĝojo ni sube enlistigas la nomojn de la lastaj individuaj membroj aliĝintaj al BKE:

Mario Ritter Nunes (RJ), Euclides Carneiro da Silva (SP), Luiz Mário Santos da Silva (SE), Evandes Barbosa (RS), Alberto Guedes Curopos (RJ), Maria Júlia Junqueira R. da Cunha (MG), Jorge das Neves (RJ), Américo Amaro de Pina (RJ), Laila Mattar (SP), Jeremias Santos (RJ), Aymoré Vaz Pinto (DF), Chersoneso Galvão (RJ), Carlos Flávio Costa Pinho (BA), Othon Branco Baena (RJ), Edmundo Paschoal Spina (SP), Delamar Augusto de Assis (DF), José Cecílio de Carvalho (MG), Erondina Godinho de Moura Tirintan (SP), José Alves Ano Bom (DF), Maria Estela Alves Gadelha (CE), Antonio Felix da Silva (MG), Mauro Libânio da Fonseca (RJ), Francisco José S. Portugal (PR), Ivon Barbosa (SP) kaj Mário Ribeiro da Fonseca Sobrinho (DF).

Al ĉiuj BKE-estraro dankas la subtenon. Tamen, ĉifoje, la speciala redakcia gratulo iru al la viroj, kiuj vigle venkis la statistikon de la periodo, pro atingo de 21 membriĝoj kontraŭ apenaŭ 4 de la "malforta sekso". Virinoj, REAGU!

## JARKOTIZO 1983

Pro la inflacio, ni estis devigata fiksi je Cr$ 2.000,00 (plialtigo de 66,66%) la jaran kotizon 1983 por individuaj membroj. Tamen, se vi ne volas malgajni, antaŭpagu tiun kotizon ĝis la 31a de Decembro. Ĉi-kaze, ni konservos la kurantan tarifon, tio estas apenaŭ Cr$ 1.200,00.



**Solena inaŭguro, de maldekstre: D-ro Walter Boppré, la Rektora Reprezentanto, S-ro Itacyr Lichtenberg kaj D-ro Ivo Sanguinetti**

## RENKONTIĜO EN KURITIBO

Organizita de Paraná Esperanto-Asocio, en kunlaboro kun Esperantaj Organizaĵoj de Santa Catarina kaj Rio Grande do Sul, okazis en Kuritibo-PR, de la 3a ĝis la 5a de septembro, la IIa Sudbrazila Esperanto-Renkontiĝo, kiun ĉeestis pli ol 200 gesamideanoj, venintaj ne nur el la tri plej sudaj ŝtatoj, sed ankaŭ el pluraj aliaj ŝtatoj de nia lando.

Pere de siaj Prezidanto, Vicprezidanto, estrarano pri Kulturaj Aferoj kaj diversaj Delegitoj, BKE reprezentiĝis en tiu grava manifestacio, kiu disvolviĝis en la Federacia Universitato de Paraná, sub patroneco de Lia Rektora Moŝto, Prof. Alcy Joaquim Ramalho.

La Renkontiĝo estis bone antaŭpreparita, kaj pro tio glate iradis la tuta programo, antaŭ la supervido de Geraldo Mattos kaj Itacir Lichtenberg, nuna Prezidanto de PEA.

Kiel ĉiam okazas, Prof. Geraldo Mattos denove plezurkaptis la atenton de la homplena aŭditorio, ĉifoje prelegante pri "Neologisma Fleksebleco de Esperanto". La eldonanto de "Fonto", s-ro Gersi Alfredo Bays, parolis pri la "Nuna stato de la eldona agado en Esperanto", kies perspektivoj, el financa vidpunkto, estas malfavoraj en la tuta mondo, precipe en Brazilo, pro manko de firma libromerkato, tio estas, pro manko ne de legantoj, sed de aĉetantoj. La problemo enlanda do solviĝos, se ĉiu esperantisto almenaŭ aĉetu po 2 libroj jare ...

Dimanĉon, matene, s-ano Wilson Ferreira Martins prelegis tuŝante diversajn problemojn ekzistantajn en nia movado, tamen facile forigeblajn per pli matura kaj objektiva agado de niaj E-asocioj kaj aktivuloj.

La lastan prelegon faris D-ro Evaldo Pauli, surbaze de sia eldonota verko "Eseo pri la Rekta Pensado". Malgraŭ tio, ke la temo plej allogus specialistojn, D-ro Pauli, pro sia kompetenteco, humileco kaj persona simpatio, kapablis tenadi la atenton de la heterogena publiko, kiu eksplodis per longa aplaŭdado, kiam samideano Sirio Silva publike informis, ke la preleganto fariĝis esperantisto antaŭ pli malpli du jaroj. BKE esperas, ke D-ro Pauli fineldonigu sian verkon kaj ĝin lanĉu en Brazilio, en decembro 1982, okaze de la III-a Jarkongreso de nia Asocio.

Dum la arta kaj teatra programeroj sukcese rolis la Gaŭĉaj Stepoj Grupo, pluraj kantistinoj, kaj la esperantaj aktoroj D-ro Braz Cosenza, Lima Cipolatti kaj D-ro Álvaro Fausto de Souza, kiuj denove majstre sin prezentis en "La Festeno de la Kardinaloj". Estas menciinda ankaŭ Mimika Teatra Grupo el Kuritibo, kiu ludis tre interesan teatraĵon.

Eksterdube, la 2a. Sudbrazila E-Renkontiĝo estis neforgesebla kunfratiĝa tutlanda festo. Pro la okazigo de tiu evento, la estraro de BKE sentas sin rekompencita kaj tre feliĉa, ĉar la dua Renkontiĝo estas natura sinsekvo de la unua, kiun ESPA brile okazigis en Porto Alegre, en septembro 1980, sub inspiro, instigo kaj patroneco de BKE, tiam sub prezidanteco de Prof. Francisco de Souza Almada.

**CASC**

## DEZIRAS KORESPONDI

★ ZDRAVA DOBREVA (str. Boris I, 140 - 1000 Sofio - Bulgario); pri ĉiuj temoj.

★ ALICA SOLTYSOVA (Partizanska, 695/77 05801 Proprad - Ĉekoslovakio); pri ĉiuj temoj.

★ PAULO S. HOPKINS (715 Donovan Ave. V9B 2A4 - Victoria - KANADO) pri ĉiuj temoj.

★ T. JAMES BRENNAN - 23 Kathrose Drive - Willowdale - Ontario M2J 3P4 - KANADO) 49j. vegetarano; pri literaturo, lingvojn, religio.

★ VLADIVOSTOKA E-KLUBO (Av. 100 let Vladivostoku 103, SU-690039 - Vladivostok - SOVETUNIO); klubanoj interesiĝas ĉefe pri poŝtkartoj.

★ MICHAT KANCZYK (Debowa 17 - PL 41-500 Chorzou - POLLANDO), 20j. muzikisto; pri arto, historio kaj literaturo.

★ GENIVAL VICENTE DE LIMA (R. Martim Afonso, 102 - 55100 Caruaru-PE - BRAZILO); pri ĉiuj temoj.

★ F-ino MARIE CLAIRE COMINOLO (74, route de Chêre - CH-1208 Geève - SVISIO); pri ĉiuj temoj.

★ ELY MARTINEZ CUÑA (Av. Marcilio Dias, 1302 - 96400-RS - BRAZILO), 56j. s-ino; pri ĉiuj temoj.


## ALPROKSIMIĜAS LA MOMENTO

Walter Francini

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, solene proklamita de Unuiĝintaj Nacioj la 10-an de Decembro 1948, estas diplomo el nur tridek artikoloj, en kiu oni enskribis ĉiujn normojn por individua kaj kolektiva vivo vere inda je la nomo "homa". La esenco de tiu dokumento baziĝas sur la tri principoj jam levitaj de la Franca Revolucio: libereco, egaleco kaj frateco. La unuaj du estas facile akceptataj, almenaŭ teorie, de la nuntempa homo, sed la tria - frateco -, estas por la plimulto, minimume, romantika vorto. Vere tra la jarmiloj multaj profetoj kaj sanktuloj instruis la avantaĝojn de la Leĝo pri Amo, bazo de ĉiuj religioj. Sed iliaj vortoj estis kaj restas nekomprenitaj de la amasoj kaj ilin atentas tre malmultaj homoj. Tamen tempo jam alvenis kiam, pro la apokalipsa detrupovo de la armiloj, la homaro troviĝas antaŭ tiu ĉi dilemo: esti frateca aŭ perei. La baldaŭa estonteco klarigos ĉu la homaro estos farinta saĝan elekton. Kiel komunaj homoj, ni estu optimismaj kaj fosu nian sulkon laŭ niaj limoj kaj kapablo.

La respekto al la homaj rajtoj estas la mezuro de la vere civilizitaj homoj kaj popoloj. Bedaŭrinde en ĉiuj landoj de la mondo, eĉ en la plej progresintaj, okazas videbla malrespekto al la homaj rajtoj. Jen kelkaj titoloj de informoj publikigitaj en la influa gazeto "Folha de São Paulo": "Ĉe Macy' s, tipa Nov-Jorka sceno" (pri rasa antaŭjuĝo kaj perforto); "En USono 1,5 miliono ne plu serĉas laboron" (statistiko pri personoj senesperiĝintaj pro la limigoj de la labormerkato); "Profesoro diras ke en Brazilo estas du Justicoj" (unu por la malriĉuloj, kaj alia por la riĉuloj); "Instruistoj persekutas lernantojn" (pere de ordonemo, vortaj agresoj kaj malaltaj taksociferoj). Ĉio ĉi kaj multo plia montras la gravecon de la respekto al la homaj rajtoj. Sur tiu ĉi kampo, klarvida civitano povas kaj devas multon fari. Jen kelkaj sugestoj: studi la Deklaracion de Homaj Rajtoj; ne postuli ke la aliaj personoj kaj la registaroj obeu al la Deklaracio sed unue ĉiu civitano respektu la homajn rajton en sia privata vivo; disvastigi la Deklaracion per ĉiuj rimedoj, nacilingve kaj Esperante; proponi la studadon de la Deklaracio en civitanaj, kulturaj kaj religiaj asocioj, unua - kaj duagradaj kaj superaj lernejoj, precipe en juraj fakultatoj kaj militistaj kaj policaj akademioj; proponi ke por plenigo de ŝtataj oficoj oni postulu de la kandidatoj la konon pri la Deklaracio; proponi ke la politikaj partioj enmetu en siajn programojn la plenan respekton al la Deklaracio por ke la reprezentantoj de la popolo agu ĉiam konforme al ĝi; festi ĉe civitanaj, kulturaj kaj religiaj grupoj la tagon 10-an de Decembro, kiam, en la jaro 1948, Unuiĝintaj Nacioj proklamis la Deklaracion; **konvene uzi la voĉdonon ĉe politikaj balotadoj**, tio estas voĉdoni nur por partioj kaj kandidatoj kiuj ŝuldiĝis al la obeo al la Deklaracio de Homaj Rajtoj. Jen demandaro kiun la balotantoj povos sendi al la politikaj partioj kaj kandidatoj al la balotado de la 15-a de Novembro, okazonta en Brazilo: 1 - Kion vi intencas fari por la homaj rajtoj? 2 - Kion vi proponas por malpliigi la perforton en la socia vivo? 3 - Kion vi intencas fari por malpliigi la ĝenojn estigatajn de la troaj burokrataj malrapideco kaj postuloj? 4 - Kion vi opinias pri la studado de neŭtrala internacia lingvo en la internaciaj forumoj?

La homaj rajtoj, pro tio ke ili estas homaj, rilatas ĉiujn homojn, sendepende de ilia kredo au filozofio. Tial ĉiu klera civitano devas plej vigle klopodi por la regado de la homaj rajtoj en la mondo, ilin respektante en la sfero de sia persona influo kaj ilin valorigante ĉe la esenca ago de la demokrata vivo, kiu estas elekti kandidatojn por politikaj postenoj.



## EL LA GAZETARO

● JORNAL DE JUNDIAI (R. Barão de Jundiai, 374 - 13200 Jundiai-SP) publikigis grandan noton pri la kursfino de Prof. Roberto Gomes Freitas.

● ESCOTISMO GAUCHO (R. Castro Alves, 398 - 90000 Porto Alegre-RS) aperigis artikolon pri la 28ª Tutmonda Konferenco, en kiu oni reliefigas, ke estas urĝe bezonata internacia lingvo. BKE skribis al ĝi montrante la valoron de Esp.; aliaj devas fari la samon.

● REVISTA ESPÍRITA DE CAMPOS (R. Antonio Alves Cordeiro, 81/85 - 28100 Campos-RJ) raportas pri nova kurso ĉe SEDAK kaj prezentas tre bonan artikolon de s-ano Vivaldino Marcelino da Silva pri la E-Fako ĉe la Biblioteko de la Ĉambro de Deputitoj.

● ASSOCIAÇÃO PAULISTA DE ESPERANTO, pere de sia Bulteno jul/ago-82, diskonigas al ni menciindajn okazintaĵojn, nome: viziton al sia sidejo, de Prof. Sylla Chaves (20-7), kiu prezentis tre interesan didaktikan materialon por uzo en moderna E-Kurso kiun li verkis; intervjuon de Prof. Walter Francini (23-8), kiu parolis pri IL en la programo "Virinoj en Parado", de TV Gazeta; debaton de la temo "Esperanto e Informática", en la Instituto pri Filozofio kaj Homaj Sciencoj (Universitato de Campinas-UNICAMP), kiel parto de studprogramo organizita de Brazila Asocio por la Scienca Progreso (14/7).

● DIÁRIO POPULAR (São Paulo), de la 11a de septembro, diskonigis informon, laŭ kiu la junulo Marcelo Whately Paiva, individua membro de BKE, gvidas elementan E-Kurson por pli ol 300 gelernantoj el la Industria Lernejo D-ro José A. Baldi, ĉe Strato Visconde do Rio Branco, 210 - Taubaté (SP). Kiu kuraĝas sekvi tiun imitendan ekzemplon?

● ELO FRATERNAL - Rua Luiz Gama, 270 (Nazaré), Salvador-BA, dissendis kvazaŭ cirkuleron dufolian kies teksto celas antaŭprepari la konsciencon de la voĉdonontoj por la proksima nacia balotado.

# CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

## Balancete en 31-07-82

### D É B I T O

| | Cr$ |
|---|---|
| CAIXA | 2.543,00 |
| BANCOS | 177.702,15 |
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO | 7.000,00 |
| IMÓVEIS | 320.000,00 |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 33.200,00 |
| PARTICIPAÇÕES | 5.000,00 |
| DESPESAS COM O BOLETIM INFORMATIVO | 121.673,30 |
| DESPESAS DA SEDE PRÓPRIA | 59.060,58 |
| DESPESAS GERAIS | 69.260,20 |
| DESPESAS LEGAIS | 4.672,00 |
| PROMESSAS E REGISTRO DE DONATIVOS PRO SEDE PRÓPRIA | 562.600,00 |
| CONTRATOS DE SEGURO | 1.680.000,00 |
| | 3.042.711,23 |

### C R É D I T O

| | |
|---|---|
| FUNDO SOCIAL | 429.942,85 |
| ANUIDADES | 138.000,00 |
| DONATIVOS PARA O BOLETIM | 103.576,00 |
| DONATIVOS PRO SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 5.500,00 |
| CONTAS CORRENTES – BEJO | 25.000,00 |
| CONTAS CORRENTES – Carlos A. S. Cunha | 38.096,00 |
| CONTAS CORRENTES – F. S. Almada | 450,00 |
| RECUPERAÇÃO DE DESPESAS | 59.546,38 |
| DONATIVOS SOB COBRANÇA | 9.000,00 |
| DONATIVOS COBRADOS | 553.600,00 |
| BENS SEGURADOS | 1.680.000,00 |
| | 3.042.711,23 |

Brasília (DF), 31 de julho de 1982

a) José Carlos Dorjni Ramos
Financa Direktoro

a) Carlos A. S. da Cunha
Prezidanto

